
# Verba gimnastiko



<table>
<tr><th>Movo</th><th>Signifo</th><th>Gestoklarigo</th><th>Ĝenerala klarigo</th></tr>
<tr><td></td><td>-as</td><td>La unua gesto (indikanta ‘ĉi tie’) simbolas la nunan tempon.</td><td rowspan="5">Dum la lernoprocezo, la ofte uzataj gestoj de la instruisto, kiujn la lernantoj trans-prenas, pruviĝas bonegaj memorigiloj por gramatikaj konceptoj. Jen gestoserio por memorigi la diversajn tempofinaĵojn.<br>La gestaron (kun ĝia sonaro) mi dum la unua leciono plurfoje ĉiam pli kaj pli rapide komplete trafar(ig)as, starante apud la ĉi supra afiŝo (vd. la antaŭan paĝon).<br>La tuta farado daŭras maksimume 15 se-kundojn. Mi klare di-vidas kun la gelernantoj la ĝuon de la simpleco de la esperanta konjugacia sistemo, komparante ĝin kun ekz. la terur-aĵoj de la franca gra-matiko.<br>Adaptu vian voĉtonon al la diversaj gestoj: la kondicionalo (deziro) ne sonas kiel la imperativo (mi volas!).<br>Se la lernantoj rapide aŭtomatigas tiun serion, ili sentos kaj spertos ke ili regas la tempon, kaj sian volesprimon. Estas tre bona sento. Poste, se okazas eraro, vi ne klarigas denove, nur mute ekfaras la gestojn.</td></tr>
<tr><td></td><td>-is</td><td>La dua gesto (indikanta la malantaŭon) simbolas la pasintecon.</td></tr>
<tr><td></td><td>-os</td><td>La tria gesto (indikanta la antaŭon) simbolas la estontecon.</td></tr>
<tr><td></td><td>-us</td><td>La kvara gesto (spiralo al la plafono, ĉielo) simbolas “se”, deziron, revon, do la kondicionalon.</td></tr>
<tr><td></td><td>-u</td><td>La kvina kaj lasta gesto (pugno frapanta la manon) simbolas la volon, la imperativon.</td></tr>
</table>